

## Raporto pri la retejo de ILEI

(Pretigita por la estraro kaj adaptita por la Komitat-kunsido de la 5-a de decembro 2022)

Laborgrupo: Cristina Bollini, Maximiliano Garcia, Alessandra Madella

1) Bazaj informoj:

- a) Laŭ Cristina **la traduka datumbazo povus verŝajne esti uzata**. Ŝi estas studanta ĝin kaj ĝian funkciadon nun.
- b) **Neniu retadreso estas ligita al la retejo**.
- c) **La retejo restas senpage sur servilo de E@I, kie eblas havi iom da disponebla spaco pli, sed ne tre multe** (ni ne estas la solaj)
- d) Eblas enmeti en la retejon la **datumbazon** de Hamzeh **pri la membroj de ILEI, protektitan pere de pasvorto**.

--> **la estraro devos decidi kion fari pri tiuj punktoj surbaze de tiuj informoj**

\*\*\*\*\*

2) **Ĝis nun**: Cristina faris kopion de la enhavo de la retejo kaj komencis esplori ĝin detale, por vidi tion, kio estas ene de la paĝoj kaj kiel ili estas strukturitaj. Laŭ ŝiaj kalkuloj estas 12 mil dosieroj (16 mil laŭ la kalkuloj de Jozefo). Do, multe da materialoj. Surbaze de tiu unua esplorado, ŝi proponas **teni la bazan strukturon de la retejo, nur purigante kaj riparante ĝin**.

\*\*\*\*\*

3) **En la proksima tempo (decembro-januario)**: Cristina proponas, ke ŝi povos unue ĝisdatigi la ĝisdatigendan:

- a) novan kaj korektan **formularon por la membroj** (kun la nuna kasisto, sen la ne-leĝaj demandoj pri aĝo kaj sekso, ktp...) --> **la estraro devus pretigi tion (indas pensi pri plia fokuso pri sekcioj)**.
- b) korekti **la nomojn kaj adresojn de la sekciestroj kaj reprezentantoj**--> **laŭ la datumojn, kiujn ni kontrolis por pretigi la komitat-kunsidon. Laŭ estrara decido, ĉiuj devas aperi almenaŭ retadreson**.
- c) **forpreni malnovajn novaĵojn el la unua paĝo**--> **la estraro devos diri, kiuj estas forprenendaj kaj kiuj novaĵoj devas pli klare aperi**

\*\*\*\*\*

4) **En iom pli longa tempo**: Cristina volas fini mapi la tutajn dosierojn kaj poste komenci tian reparadon:

- a) ŝanĝi **word-dosierojn al pdf**
- b) **malvidebligi la duoblajn paĝojn, tiujn sen enhavo, ktp** --> **por ĉiuj duboj, ŝi demandos al la estraro**.
- c) laŭ propono de Jozefo, Cristina povos pretigi **paĝon (+ arkivon), kiu prenos la enhavon de la retejo de IPR, kreita de Jozefo. Simila paĝo povus esti kreata por Juna Amiko**--> **la estraro devos pripensi eblecojn akiri ties jam ekzistantajn skanitajn kopiojn**.

\*\*\*\*\*

5) Ĉefaj taskoj de la estraro:

a) La estraro devas komenci pripensi pri la enhavo kaj la formo, se ŝanĝoj estas necesaj, kiel eble plej konkrete kaj kiel eble plej multe surbaze de tio, kio jam ekzistas.

b) Se la estraro volas, **pasvort-protekta areo** (krom la pli sekura datumbazo de Hamzeh) fareblas--> **la estraro devas pensi pri la celoj de tio.**

\*\*\*\*\*

7) Se la traduka datumbazo ne povos esti efike uzata, Cristina esploros aliajn vojojn. --> Ŝi sugestas, ke **intertempe ni mem pretigu la tradukon de kelkaj paĝoj en pluraj lingvoj (por UNESKO, ktp), se necese.**

\*\*\*\*\*

8) Cristina volas lasi **dokumenton pri la faritaj laboroj**, tiel ke estu pli facile por la venontaj homoj kompreni kiel eniri, kiel la retejo funkcias kaj kion ili povas fari. --> **Ni devus decidi, kiu poste tenos tiun dokumenton.**

\*\*\*\*\*

9) **Per tiuj ŝanĝoj pri la retejo estos neniuj ŝanĝoj pri la laboro de Jozefo kaj neniuj dokumentoj estos forviŝitaj.**